HÉROUVILLE-ESPÉRANTO

Maison des associations - 10.18, Le Grand Parc - 14200 Hérouville Saint Clair - esperanto.herouville.14200@gmail.com

Magazine édité par l'association Hérouville-Espéranto - Maison des associations - 10.18 Le Grand Parc - 14200 Hérouville Saint-Clair
Directeur de la publication : Bertrand Verstraete - Révision et correction: Françoise Fransoazo Noireau
Imprimé par nos soins - Dépôt légal septembre 2026 - ISSN 2648-3203 - Prix : gratuit.
Deponita ĉe Bibliothèque Nationale de France, Österreichische National Bibliothek (Vieno, Aŭstria)
Archives départementales du Calvados, Fonds Normand de la Médiathèque Alexis de Tocqueville (Caen), Bibliothèque de Cherbourg.

La 17-an de julio forpasis post longa kaj kuraĝa lukto kontraŭ evoluanta kancero, nia samklubano Bernard Dufresne el Havro. Li estis akompanata de familia kaj amika rondoj kaj ŝirmata de nia kara standardo laŭ sia volo dum adiaŭa ceremonio.

Tiuj, kiuj konatiĝis kun li, memoros pri konvinkita samideano kaj fervorega prozelito de Esperanto. Li esperantistiĝis post la dua mondmilito en Fécamp.

Lia karaktero estis forĝita de liaj junecaj travivaĵoj, kiuj favoris entreprenemon, parolliberecon, fervoron pri homaj rajtoj kaj internaciecon. Li estis entuziasma esperantisto, kunordiganta energiojn por komunikado (loka retejo, turisma dokumentaro).

Laŭ la fluo de la jaroj, li iom forlasis la naciajn okazaĵojn, tamen li plu dediĉis sin por dokumenti pri Zamenhofaĵoj aŭ esperantista filatelo.

Li forlasis iun someran vesperon nian samideanaron, post dudekkvinjara amika kunirado.

Ripozu pace, amiko Bernard!

Sylvie el Havro

Frontartikolo

Kiel testudoj, bufoj, helikoj, salamandroj aŭ lumbrikoj, kiuj somere dormas por eskapi varmon kaj dehidratiĝon, ni estus povintaj senaktiviĝi en la sufoka torporo de la ĉijara varmega somero, atendante pli malvarmetajn aŭtunajn tagojn.

Sed, fakte ne ĉesigis la esperantan vivon dum julio kaj aŭgusto.

En Julio, klubanoj vizitis la parmajn esperantistojn. En la komenco de aŭgusto ne malpli ol 13 samklubanoj ekskursis al la abatejo Bricquebec kaj pasigis amikan tagon kun nia samklubano Marcel (Patro Marko), la 5-an de septembro la klubo partoprenis en la tradicia Festo de la Asocioj en Hérouville. La 8-an, krom estrara kunveno okazis neformala rekomenca kuniĝo.

Ne forgesu, ke la unua kurso estas planita la 15-an de septembro kaj la jarĉefkundiso la 10-an de oktobro. Notu kaj rezervu la datojn!

Post la kongresa jaro, novaj projektoj anonciĝas.

"*Vivi estas kiel bicikladi, daŭre vi devas moviĝi por konservi ekvilibron*", diris Einstein kiu, en 1923, honore prezidis la trian kongreson de SAT en Cassel (Germanio). Nu, ek!

Bertrano

Enhavo

Cotisations 2026-2027 2
Ĝenerala jarĉefkunsido de Hérouville-Espéranto 3
Calendrier prévisionnel 2026-2027 3
Helpi al la nepalanoj ..... 4 & 5
Kiel la klubo kaj la klubanoj pasigis siajn feriojn, tamen esperantistajn ..... 6 & 7
Somera ekskurso al Bricquebec ..... 8, 9 & 10
Loups-garous, goubelins et autres sorcières en Normandie 11
La magia spuro 12
Kanti, legi kaj verki ..... 13 & 14
La strandoj de la Elŝipiĝo fariĝis Monda heredaĵo 15
Memorturismaj paĝoj: laŭ la strandoj de la Elŝipiĝo (2/4) 16
Literaturaj paĝoj: La Preĝo de la Milito (traduko de la novelo de Mark Twain) ..... 17 & 18
Komputaj paĝoj 19
Vinilkosmo aperigas *Revivi*, disko de la normanda kantisto Armel Amiot 20

NORMANDA ESPERANTO-BULTENO

n-ro 296- a
Aŭtuno 2026

Kotizoj 2026-2027

Depuis 2025, notre club adhère au **dispositif de cotisation interasociative porté par Espéranto-France**.
Ainsi, en réglant votre cotisation, **vous deviendrez simultanément membre, pour la période du 1er octobre 2026 au 30 septembre 2027 et d'Hérouville-Espéranto et d'Espéranto-France**.
Si vous êtes imposable, vous bénéficierez d'une réduction d'impôt de 66 %.

Votre cotisation est à régler *à partir du 1er octobre.*
N'effectuez aucun paiement avant cette date, sous peine de voir votre règlement comptabilisé sur l'année précédente.

Montant (inchangé) des cotisations des klubanoj:

- **Plus de 36 ans, imposable : 65 €** (H-Eo. 35 + Eo-F. 30) **soit 22,10 € après déduction fiscale**.
- **Moins de 36 ans, imposable : 50 €** (H-Eo. 35 + Eo-J. 15) **soit 17,00 € après déduction fiscale**.
- **Plus de 36 ans, non imposable : 22 €** (H-Eo. 10 + Eo-F. 12).
- **Moins de 36 ans, non imposable : 10 €** (H-Eo. 5 + Eo-J. 5) .

Vous pouvez régler votre cotisation par carte bancaire en ligne sur 🔗 le site d'Espéranto-France.
Si vous n'êtes pas à l'aise avec cette procédure, vous pouvez régler par chèque ou carte bancaire auprès du trésorier de notre club.

Ceux qui souhaitent adhérer à Hérouville-Espéranto mais qui, pour des raisons de santé ou d'éloignement, ne peuvent prendre part que de façon très exceptionnelle à nos activités peuvent, par dérogation, adhérer à Hérouville-Espéranto en qualité d'amiko, sans adhérer à Espéranto-France,.
Ce faisant, il sont pleinement membres d'Hérouville-Espéranto et peuvent prendre part aux assemblées générales et participer aux instances de notre association..
Cette formule n'ouvre cependant droit à aucune déduction fiscale.

Montant des cotisations des "amikoj" :

- **Plus de 36 ans : 15 €**
- **Moins de 36 ans : 10 €**

Les cotisations des amikoj sont à régler auprès du trésorier du club par le moyen à votre convenance (numéraire, chèque à l'ordre h'Hérouville-Esperanto, carte bancaire, virement bancaire sur le comîte Hérouville-Espéranto (IBAN : FR 76 1027 8021 2700 0212 2800 162 BIC : CMCIFR2A - Caisse de Crédit Mutuel de Caen Centre).

Listo de la 33 kotizintoj 2025-2026

Brunet V., Cagnard C., Caron-Liray S., Charles V., Colbert J., Cottin B., Dalibert F., Danel K., Danel J., Dion C., Dufeu P., Duflot M., Dufresne B. (†), Ferrand C., Fortin F., Fortin J.-M., Girard V., Hardel E., Langeois M., Lemarié S., Lemeltier M., Leprévost A.-M., Marlier-Riquier C., Plantade F., Rouget C., Roussigné S., Sauvage J.-P., Sénécal Gé., Sénécal Gi., Tarlevé B., Teani M., Troisgros R., Verstraete B., Verstraete V.

Pas encore espérantiste ? Rejoignez-nous !

Nos cours se déroulent tous les mardis (hors vacances scolaires) de 17 h 30 à 19 h 00 à la Maison des Associations : 10.18 Le Grand Parc à Hérouville Saint-Clair

Si vous ne pouvez pas nous rejoindre, vous pouvez participer au **cours en ligne gratuit I -Kurso.** Un **correcteur** vous accompagnera votre progression au cours des **10 leçons** que vous suivrez **à votre rythme**.

Renseignements : esperanto.herouville.14200@gmail.com

La 10-an de oktobro... Partoprenu en nia ĝenerala jarĉefkunsido!

Ĝenerala jarĉefkunsido 2026-2027

DATE
Le samedi 10 octobre 2026
HEURE
10 heures 00
LIEU
Café solidaire *Ô beau café*
Centre commercial des Belles Portes
Hérouville-Saint-Clair

ORDRE DU JOUR PRÉVISIONNEL :
Rapport d'activité et rapport financier de l'année 2025
Modification des statuts et du règlement intérieur
Élections statutaires
Plan d'action 2026-2027
Budget 2026-2027
Questions diverses.

Comment prendre part aux votes ?

- en étant présent
- en votant par anticipation par voie électronique sur le site Balotilo.org, au moyen du lien personnel et confidentiel qui vous sera envoyé par courriel ou par SMS début octobre
- en donnant procuration.

Pour que l'assemblée générale puisse valablement statuer, il faut que 50 % au moins des adhérents prennent part au vote. **Nous comptons sur votre participation.** Elle contribue à la vitalité de notre association.

CALENDRIER PRÉVISIONNEL DES ACTIVITÉS EN 2026-2027

La 15-an de septembro
Ree al la klubo !

Réunions hebdomadaires du mardi
(17:30 – 19:00+, hors périodes de vacances scolaires)

- **1ère période :**
  les 15, 22 et 29 septembre,
  les 6 et 13 octobre
- **2ème période :**
  les 3, 10, 17 et 24 novembre,
  les 1er, 8 et 15 décembre Zamenhofa tago
- **3ème période :**
  les 5, 12, 19 et 26 janvier,
  les 2, 9 et 16 février
- **4ème période :**
  les 9, 16, 23 et 30 mars,
  les 6 et 13 avril
- **5ème période :**
  les 4, 11, 18 et 25 mai,
  les 1, 8 et 15 juin.

Desegnis
Justin Fouade (69)

Bharat Kumar GHIMIRE naskiĝiinta la 23-an de februaro 1972 en orienta parto de la lando estas nepala esperantisto.

Li esperantistiĝis en 1990. Profesie li estas instruisto pri la angla lingvo.
Li instruas Esperanton ekde 1991 en diversaj lokoj de Nepalo kaj de Filipinoj. Li fondis Esperanto-asocion en Filipinoj kaj kunfondis la Internacian Himalajan Renkontiĝon.

Li estas estrarano de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI kaj reprezentis sian landan asocion en la komitato de UEA.

Li nuntempe prezidas NEspA, la Nepalan Esperanto-Asocion.

Nepalo, la 28-an de aŭgusto,

Karaj Samideanoj,

Mi volas informi vin pri la grandega katastrofo, kiu okazis antaŭhieraŭ ne tre for de la Katmandua Valo.

Antaŭhieraŭ, la 26-an de Aŭgusto, ĉe ni okazis grandega katastrofo. La rivero Bhotekoshi, kiu elfluas el Tibeto, estis blokita de granda terglito kaŭzita de la neĝo kaj degelo. Samtempe okazis eta tertremo kun magnitudo de ĉirkaŭ 4,5.
Oni ankoraŭ ne klare scias, ĉu la tertremo kaŭzis la tergliton aŭ ĉu la moviĝo de la terglito mem kaŭzis la tremadon de la tero. Post kiam la rivero estis blokita, formiĝis granda lago. La akvo ne povis longe resti en ĝi, kaj fine la digo cedis. Grandega kvanto da akvo kun granda forto fluis malsupren al la nepala flanko. Laŭ kelkaj informoj, la akvonivelo atingis eĉ ĉirkaŭ 200 metrojn. La rivero Bhotekoshi fluas tra Nepalo dum ĉirkaŭ 150 kilometroj, interfluiĝante kun aliaj riveroj, kaj laŭ tiu tuta vojo okazis grandegaj detruoj.

La regiono estas tre grava turisma loko. La fama celo de piedvojaĝantoj, Langtang, troviĝas en tiu regiono. Ankaŭ la 15-a Internacia Himalaja Renkontiĝo de NEspA okazis tie. Ni tiam restis en 332 Syabrubesi, sed nun ni aŭdis, ke tiu hotelo estis forlavita de la inundo. Ŝajnas ankaŭ, ke la posedanto de la hotelo estas inter la malaperintoj. Laŭ la nunaj informoj, miloj da homoj eble estas malaperintaj, kvankam la ĝusta nombro ankoraŭ ne estas konata.
En tiu regiono troviĝas ankaŭ gravaj pilgrimejoj, interalie Gosaikunda, sankta lago en la Himalajo, kaj la regiono de Monto Kailash kaj Manasarovar en Tibeto. Multaj pilgrimantoj, kiuj vojaĝis al Manasarovar en Tibeto, devis veturi laŭ tiu rivero dum ĉirkaŭ 100 kilometroj. Laŭ la nunaj informoj, granda parto de tiuj pilgrimantoj estas malaperintaj. Laŭ la nuna statistiko, ĉirkaŭ 600 pilgrimantoj estas ankoraŭ serĉataj. Ankaŭ estas multnombraj turistoj el diversaj landoj, sed la plej multaj estas el nia najbara lando, Barato. Ĉiuj vilaĝoj kaj urbetoj laŭ la rivero Bhotekoshi estis grave trafitaj de la inundo.

Ĝis nun oni trovis ĉirkaŭ 600 kadavrojn. Multaj homoj ŝajne mortis pro la grandega forto de la akvo, kiu portis kun si grandajn ŝtonojn, sablon kaj aliajn materialojn. Pro tio multaj el la trovitaj kadavroj estis grave difektitaj. Multaj lernejoj, vilaĝoj, bankoj, elektrocentraloj, pontoj, agrikulturaj kampoj, policaj oficejoj, armeaj kampoj kaj doganaj oficejoj estis detruitaj aŭ forlavitaj. Tiu vojo estas la ĉefa konekto inter Nepalo kaj Ĉinio por kulturo, religio, turismo kaj komerco. Ankaŭ granda nombro da aŭtoj importitaj el Ĉinio estis forportita de la inundo.

La informoj el la tibeta flanko venis iom malfrue. Pro tio multaj homoj en Nepalo ekvidis la inundon, kiam ĝi jam komenciĝis. En la pli malaltaj lokoj oni tamen avertis la loĝantaron, sed multaj homoj nur ne kredis la avertojn, ĉar ili ne povis imagi, ke la inundo estos tiel grandega. Ĉe kelkaj ne rimarkis ĝin. Krome, tiutempe eĉ ne pluvis, kaj pro tio la homoj ne atendis tiel grandan katastrofon.

Antaŭ du jaroj okazis inundo en la sama regiono. Ankaŭ ĝi kaŭzis multe da damaĝoj, sed ĝi estis multe malpli granda ol la nuna katastrofo. Ĉi-foje la temperaturo estis nekutime alta. Pro la varmo okazis degelo, kiu eble kontribuis al la terglito. La terglito blokis la riveron kaj formis grandan lagon. La lago ne povis reteni la grandegan kvanton da akvo, kaj fine ĝi rompiĝis, liberigante grandegan akvo-kvanton malsupren laŭ la rivero.

Hieraŭ mi proponis al mia kolegio kolekti helpon por la viktimoj. Ni jam kolektis ĉirkaŭ 500 usonajn dolarojn kaj aldonis ilin al la fonduso de la Ĉefministro por helpi la viktimojn. Ni ankaŭ planas kolekti monon nome de la Nepala Esperanto-Asocio kaj kontribui al la helpo por la viktimoj de tiu grandega katastrofo. Mi kolektos la tutan sumon kaj poste transdonos ĝin al la koncerna fonduso aŭ helpkomisiono. Ni fidas je la nuna registaro kaj esperas, ke ĝi faros ĉion eblan por helpi la viktimojn kaj rekonstrui la detruitajn 333 regionojn.

Se iuj eksterlandaj esperantistoj volas helpi, ili povas, tute libervole, sendi monon al nia UEA-konto: neea-j. Bonvolu nepre skribi "Katastrofo en Nepalo 2026" kiel referencon.

Nia landa asocio decidis kolekti monon kaj kontribui al la helpo por la homoj, kiuj perdis siajn familianojn, hejmojn kaj vivrimedojn. Multaj familioj perdis plurajn membrojn, kaj multaj aliaj homoj estas vunditaj. Multaj infanoj fariĝis orfoj, kaj la situacio en unu horo fariĝis kvazaŭ sceno el filmo. Mi foje vidis en Facebook tiajn scenojn faritajn per artefarita intelekto, sed nun la realo okazis ĉe ni.

Kore, Bharat Kumar Ghimire Prezidanto de la Nepala Esperanto-Asocio

P.S.
Laŭ la ĝisnunaj informoj, neniu membro de la Nepala Esperanto-Asocio estas viktimo de la katastrofo. Tamen ni devas ankoraŭ atendi, ĉar la situacio ne estas plene klara. En Nepalo estas multaj esperantistoj, kaj ne ĉiuj estas membroj de la nacia asocio; kelkaj estas neaktivaj aŭ dormantaj membroj. Krome, nun estas periodo de religiaj festoj, kaj kelkaj esperantistoj vojaĝis tien, kie okazas la festoj, do ni ankoraŭ ne scias pri ĉiuj. Pro tio ni eble bezonos iom da tempo por kontakti ĉiujn kaj kontroli, ĉu ĉiuj estas en ordo.

Pictures elThe Nepali Times'

Unue aperis en ***Voĉoj el la Mondo***, 26.08.2026
kun permeso de HORI Jasuo

Vizito al la parmaj esperantistoj

La 16-an de julio ni bonŝancis renkonti en Parmo (Italio) esperantistajn klubanojn de la "*Gruppo Esperantista Giorgio Canuto*", kiun ni jam vizitis antaŭ tri jaroj kaj duono.
Luigia invitis dekon da homoj por kune manĝi vespere en bona tradicia picejo, proksime al nia loĝejo.
Tiel ni konatiĝis kun Patro Gustavo. Li estas benedikta monaĥo kaj esperantisto, membro de la klubo. Li tre afable proponis al ni privatan viziton de la monumenta biblioteko de sia abatejo *San Giovanni Evangelista* (Sankta Johano la Evangeliisto).
Danke al la erudiciaj komentoj de nia sperta ĉiĉerono, ni malkovris tiun ĉi belegan lokon. Aparte mirigis nin ĝiaj pentritaj plafonoj, sur kiuj videblas multe da simboloj pri la vivo de Kristo. Rimarkindaj estis la tekstoj skribitaj en la itala kaj en la latina kompreneble, sed ankaŭ en la hebrea, en la antikva greka, kaj en la araba.
Ĉu iam Patro Gustavo aldonos tekstojn en Esperanto al la plafono ? Ili mankas!
Espereble, la italoj siavice vizitos nin iun tagon.

Raportass Vero el Jibervil'

Vizito al Pluezek

Raportas kaj fotis Elisabeth el Herouvil'

La Esperantaj kunvenoj en Plouezec (Pluezek) okazis de la 21a ĝis la 23a de aŭgusto 2026. Mi ĉeestis nur vendrede kaj sabate matene, sed estis granda plezuro aŭdi kaj aŭskulti la lingvon internacian facile parolata de la plejmulto de la partoprenantoj. Vera mergiĝo en Esperanton!
Mi ĝuis la varman bonvenigon de la bretonaj organizantoj kaj, krome, tre belan veteron.

Mi ĉefe ĉeestis la Esperantajn kursojn gviditajn de la gastoj: Narendra kaj Rajani Raj Bhattarai, el Nepalo (*), Jean-Claude Roy - tradukisto en Esperanton de la verko de la gajninto de la Goncourt-premio de 2017 kaj de Tagordo - kaj Chantal Allen, kiu prelegis dum la kongreso de Espéranto France.
En la unua leciono, Rajani prezentis sian landon: ĝian fizikan geografion, ekonomion, kastsistemon, geedzecajn kutimojn kaj la tri vivantajn diinojn (unika trajto de Nepalo), poste li respondis al la multaj demandoj.
Malsama metodo estis uzata en la dua leciono: Jean-Claude formis grupojn de kvin aŭ ses, kaj ene de ĉiu grupo, la studentoj devis respondi tri demandojn kaj skribi notojn. Tre interesa instrumetodo.
Fine, tre amuza sabatmateno: unue, kuiradkurso kaj preparado de nepala plado servota ĉe manĝo: salato de terpomoj.
Due, vestiĝo; pluraj virinoj el Bretonio havis siajn sariojn, kaj Narandra montris al ili kiel surmeti ilin.
Trie, Chantal finis per ludo, en kiu partoprenantoj devis uzi simile sonantajn vortojn en la ĝusta kunteksto (ekz., polpo, poplo, pulpo).

Multaj aliaj agadoj estis ofertitaj dum tiuj tri tagoj : turismo ĉe la maro kaj enlande, kun gvidataj rondiroj en Esperanto, prelego pri Esperanto kaj AI, Esperantaj ludoj kaj, malkovro de la bretona bulludo; partopreno en lokaj festadoj, dimanĉon.

(*) : La renkontiĝoj okazis tri tagojn antaŭ la katastrofo en Nepalo.

Mi rimarkis miajn malfacilajojn, sed kun pacienco, mi pliboniĝos. Ĉi tiuj kelkaj tre riĉigaj horoj povus senkuraĝigi min, sed tute male. Mi certe esperas ripeti ĉi tiun sperton ĉe la venontaj kunvenoj de Pluezek! Renkonti esperantistojn el diversaj fonoj ankaŭ estis tre agrabla kaj stimula. Ĉu mi instigis vin ĉeesti unu el iliaj venontaj kunvenoj?

Recepto de la nepala terpoma salado

- Kuiru la terpomojn en ĝiaj ŝeloj
- Rostu kaj dispremu sezamograjnojn
- Kuiru cepojn en iom da oleo kaj aldonu ilin al la plado
- Finfine, aldonu iom da spicoj kaj bazilion aŭ verdajn foliojn de koriando

Miaj ferioj.

Raportas Claude el Kaeno'

Dum niaj lastaj ferioj mi vojaĝis suden por ĉefe renkonti familianojn. Unue, ĝis Figeac, ĉarma mezepoka urbo kie naskiĝis Champollion kiu malkovris hieroglifojn (egiptan antikvan skribajon). Ni tie vizitis interesegan muzeon pri tio. Ni ankaŭ promenadis laŭ mallarĝaj stratetoj kaj gapis fronte al trabardomoj. Miaj tri fratinoj loĝas en Figeac . Tie varmegis. Due, de tie, ni aŭte trafis Karkasonon, kie vivas kuzinoj. Kompreneble, ni kune admiris la citadelon kaj tiajn impresajn fortikajojn. Homoj amasumis tie.
Kaj poste , ni virtuale vagadis ? Kiel ?
Vi memoras, ke ni akceptis Ŝandor kaj Helen, niajn samideanojn de Aŭstralio. Do, post nia eruvila kongreso, ili restadis dum pli ol tri monatoj en Eŭropo. Ili partoprenis kelkajn Esperantajn kongresojn: en Aŭstrio (Grazo), en baltaj landoj, en Italio, kaj vidis konatojn en Francio, Nederlando, Germanio ... Ili sendis al mi fotojn kaj impresojn ... Tiele mi povis sekvi ilin .

Festo de la asocioj

Raportas kaj fotis Bertrand el Herouvil'

Hérouville kalkulas pli ol 400 asociojn.
Dimanĉon la 6an de septembro, 90 el ili partoprenis en la festo de asocioj.

Fine de la mateno, François kaj mi instalis la budon de Hérouville-Espéranto. Ni manĝis la sandviĉon donacitan de la urbo antaŭ la 13a, la horo de la malfermo al la publiko. Ses klubanoj deĵoris.
Je la 15a, Claude kaj Marie-Anne siavice deĵoris por informi la publikon pri la klubo, ĝiaj agadoj, kursoj, eventoj, kaj... pri ĝia amika etoso... resume pri ĉio kio konsistigas la vivon de Hérouville-Espéranto. Elizabeth kaj Véronique zorgis pri la budo inter la 17-a kaj 18-a kaj, kiam finiĝis la festo, reprenis la materialon.

Niaj vizitantoj
Niaj vizitantoj estas diversaj. Kelkaj reprezentantoj de asocioj faras al ni la honoron de amika vizito, ekzemple Anne-Marie Sibireff, kiu gvidas la „Filozofiejon“. Niaflanke, ni vizitis „Hérouville-Mémoire“, la asocion, kiu gvidis ekskurson dum la kongreso de Espéranto-France en Hérouville pasintan majon.
Jaron post jaro, kelkaj homoj revenas viziti nin. Unu diris „Mi lernis Esperanton jam antaŭ longe; ĉu vi plu ekzistas?“ Alia informiĝas, por la dua jaro, pri la venontaj kursoj. Nia respondo estas ĉiam : “Venu, aliĝu kaj malkovru niajn amikajn kunvenojn .“ La renkontiĝo kun junulino ĉirkaŭ dudek jaraĝa estis ja kuraĝiga. „Mi pasias pri lingvistiko, mi ŝatus scii pli pri Esperanto, la universala lingvo.“ Ni donis al ŝi kelkajn ŝlosilojn por malkodi nian lingvon, la horarojn de niaj kursoj kaj la telefonnumeron por kontakti nin.

Tempo por interkonatiĝi kun la aliaj asocioj.
Matene, post bonveniga matenmanĝo, la organizintoj proponis tempon por interkonatiĝi. 60 asocioj estis reprezentataj de siaj gvidantoj por interŝanĝi informojn per rapidrenkontoj. Dum unu horo kaj duono, tiel estis organizitaj 300 kvinminutaj renkontoj! La sperto montriĝis instiga, ĝi verŝajne estos denove organizataj venontjare.

Kaj denove, venontan jaron nia klubo partoprenos en la festo por disvastigi la internacian lingvon!

Somera ekskurso al Bricquebec

La 8-an de aŭgusto, 13 anoj de nia klubo havis la plezuron ekskursi en Bricquebec (Manche) kaj konatiĝi kun Patro Marko, esperantisto kaj monaĥo de la tiea Abatejo Nia Sinjorino de la Graco (Notre-Dame de Grâce)
La tutan tagon ardis bela varma suno, kiu ebligis tre agrablajn kaj amikajn diskutojn kaj malkovrojn, akompanatajn de kafo kaj porkaĵoj.

Komence bonvenigis la grupon Clémence antaŭ la abatejo de «la Trappe», proksime al la urbeto. Clemence estas la helpantino de Patro Marko, 91-jaraĝa, kaj loĝas proksime al la abatejo. Ŝi tre bone priskribis tiun viran cistercan mondon, kiun ŝi tre bone konas, el virina vindpunkto. Ni multe dankas al ŝi pro ŝiaj kompletaj klarigoj, ŝia klereco kaj ŝia bona humoro. Ni parolis pri la monaĥa vivmaniero kaj filozofio.
Ŝi montris al ni la preĝejon, kies arta valoro ŝi reliefigis.

Ni tagmanĝis en la gasta refektorio de la abatejo, kaj poste iris ĝis la loĝejo de la patro Marko.
Sub arbo, antaŭ sia domo, li atendis nin trankvile - kvankam senpacience - .
Lia «loĝejo» ... Fakte temas pri eksaj porkostaloj rearanĝitaj en kelkaj ĉambroj, kun elektro kaj flua akvo.
Li vivas iom aparte, kelkajn centmetrojn for de la aliaj fratoj, meze de herbejo, kaj ĝuas sian etan mondon.
Li persone kreis la aktivecon de porka bredado por la abatejo dum la 1960-aj jarojn. Li gvidis ĝin dum jardekoj kaj, eĉ nuntempe, daŭre kontrolas la kvaliton de la produktitaj porkaĵoj.

Patro Marko estas malnova ano de la normanda esperanta klubo. Jarkunveno de la normanda asocio okazis en Bricquebec antaŭ kelkaj jaroj, en junio 2013. Du aŭ tri malnovaj klubanoj ĉeestis kaj rememorigis la eventon kun Marcel (la vera nomo de Patro Marko), kafumante sub la arbo. Tagmanĝinte, sub la varmega somera suno meze de la herbejo, ni ĝojis ĝian freŝigan ombron.

Patro Marko estas homo kun solida karaktero kaj havas multon por rakonti. Ni parolis pri la abatejo, pri lia infaneco, pri la normanda kaj la hebrea lingvoj, ktp.

Li akompanis nin por promeni al la apuda Abareto de la Ŝtonegoj (Bois des Roches). Rémi klarigis multajn aferojn pri geologio, arbaroj, kaj Clémence pri la vivmaniero de la gaŭloj.

Reveninte al la abatejo, ni kune trinkis bieron kaj kundividis vesperan piknikon. Interalie ni kompreneble manĝis pastecojn kaj rijetojn de la abatejo, pri kies kvalito interŝanĝis Patro Marko kaj Clémence.

Ni aŭdis tradukon al la normanda de la Libro de Ester, el la Malnova Testamento, faritan de la Patro Marko.

Jam subiris la suno kaj venis tempo forlasi Patron Marko, sub lia saliko, certe iom laca... sed tute feliĉa .

Verkis
Simon el Kaeno

Fotis Bertrano
el Ĵbervil'

Post nia komuna manĝo en la abatejo de Bricquebec (Brikbek) sabate, la okan de Aŭgusto, la grupo de Hérouville kune kun Patro Marko veturis al la Arbareto de la Ŝtonegoj (Bois des Roches).
Tiu arbareto estas fama pro siaj grandegaj rokoj, kiuj donas al la loko aspekton sufiĉe misteran por inspiri legendojn aŭ fantasmajn rakontojn.
Patro Marko interesiĝis pri mistikaj fortoj.
Mi gvidis la grupon tra la arbaro sed, ve (mi pardonpetas al la ŝatantoj de misteroj), mi donis nur konkretajn klarigojn.
Estas tri interesaj temoj pri la arbareto.

Historia

La loko estis okupita de prahistoriaj homoj dum la ŝtonepoko . Oni povas admiri restaĵojn de tiu periodo ne malproksime de la grupo de rokoj nomita “la eta roko” (la petite roche). Temas pri kovrita aleo kiu estas la restaĵo de tombo (mankas pluraj supraj horizontalaj ŝtonoj. La monumento estis konstruita ĉirkaŭ 2.800 jarojn a.K
Tiuepoke, la tombejo estis kovrita de tero, la eniro al la ĉambro de la mortintoj estis ĉe la okcidenta flanko. La aleo estis listigita kiel historia monumento en 2016.
Kelkaj iloj (ŝtonaj kaj kupraj) estis trovitaj apud la aleo pruvante, ke prahistoriaj homoj uzis la lokon eble kiel setlejon.

Geologia

La rokoj videblaj en la arbaro estas el grejso. Grejso estas sedimenta roko konsistanta ĉefe el kunpremitaj kaj cementitaj sableroj. Ĝi formiĝas kiam sablo, ofte deponita sur la marfundo aŭ en alia sedimenta medio, iom post iom kunpremiĝas kaj la grajnoj ligiĝas per natura minerala cemento. La sedimentoj povas poste esti enfositaj kaj levitaj dum la formado de montaro. La montaro, kiu provokis tian premon estas la Armorika Montaro. Nuntempe restas nur malaltaj montetoj precipe en Bretonujo. La aĝo de tiuj rokoj estas proksimume 450 milionoj da jaroj. Oni povas diveni la klinon de la rokaj tavoloj kaj imagi la gigantan premon, kiu puŝis ilin.

Arbara

Krom ĝiaj historiaj kaj geologiaj flankoj, la arbareto de la ŝtonegoj estas antaŭ ĉio arbaro!
Kvankam la Manika departemento (La Manche) enhavas la plej longan kunmetitan longecon de arbecaj heĝoj (haies bocagères), ĝi enhavas la malplej grandan surfacon de arbaroj.
Konsekvence, eĉ eta arbaro gravas por la Manika naturo.

La arbareto apartenas kaj estas mastrumata de la urbestraro de la urbeto “Rocheville”. Ekde 2010, ĝi estas agnoskita kiel natura rezervejo. La arboj ne estu hakataj, krom se ili fariĝas danĝeraj por la vizitantoj.
La natura rezervejo celas ankaŭ la konservadon de la rokegoj.



pedunkla kverko



kaŝtanarbo



betulo

fago

ilekso

La arbaro entenas pluraj specoj da arboj :

- **Pedunkla kverko** (chêne pédonculé) : tiu kverko abundas en malsekaj arbaroj, kiel tiu de la rokegoj. Gî povas elteni inundojn sed ne eltenas longajn periodojn da sekeco. Tamen, ĝia latina nomo (*querqus robur*) signifas la *fortan kverkon.*
- **Kaŝtanarbo** (châtaignier) : Ĝi estas kuzo de la kverko (el la sama familio). Post kiam ĝia trunko estas hakita, novaj plantidoj kreskas tre vigle desur la stumpo. Ĝia frukto estas tre bongusta, ĝi estas uzata por kuiri kanditajn kaŝtanojn (glazuritaj maronoj).
- **Betulo** (bouleau) : Tre bela arbo kun blanka kaj nigra ŝelo, ĝi povas kreski preskaŭ ĉie. La betuloj estas pioniraj arboj. Ili bezonas multe da lumo, kaj malaperos sub pli fortaj kaj viglaj arboj.
- **Fago** (hêtre) : La nomo de ĝia familio venas de ties nomo (*fagaceae*), aliajn kuzoj ni vidis ĉi-supre. La foliaro de tiu arbo estas tre densa; la lumo ne povas atingi la grundon pro la baro de la folioj. Tial, kvazaŭ nenio kreskas sub la branĉaro de fago. Fagoj povos esti endanĝerigitaj pro la klimata ŝanĝiĝo. Pro radikaro tre proksima al la surfaco, la arboj estas maltoleremaj al sekeco.
- **Ilekso** (houx): Kvankam ĝi povas kreski ĝis la grandeco de arbo, maloftas ileksarboj. Plej ofte, ili troviĝas en la ombro de aliaj arboj. Ili kreskas tre malrapide, tial ili estas precipe arbetoj. Ilekso estas ido de tre malnovaj arboj, kiu kreskis en tropikaj arbaroj antaŭ la glaciaĵperiodo. Por adaptiĝi al malvarmegeco, la surfacaj ĉeloj de la folioj (i.e. la brila surfaco) evoluis al dika, vaksa surfaco, kiu protektas la ĉelojn de la folio.

Grundo

Arbara grundo estas la rezulto de evoluo de morta vegetala materialo (folioj, branĉetoj) al humuso, kiu danke al ago de insektoj, vermoj, fungoj, bakterioj, miksiĝas kun eroj de la subgrundo (roche-mère). Tie, la subgrundo estas evoluinta al silto (detrita sedimento) kaj sablo. La rezulto estas acida sabla silta grundo (france, *limon*). Tiu grundo, kvankam tralasema (pro sablo) estas tamen sufiĉe malseka. La akvotavolo sendube estas ne tro malproksima de la surfaco.

Ĉiuj partoprenantoj de la vizito ege ŝatis la lokon. Se vi vizitos la Manikan departamenton, nepre lasu viajn sentumojn ĝui la ĉarman etoson de la arbeto de la Rokegoj.

Ekzistas ankoraŭ multaj aliaj belaj vidindaĵoj.
Paciencu !

Verkis kaj fotis
Rémi el Auvers

Il ne m'est pas possible d'évoquer directement les goubelins et les loups-garous du « Bois des Roches », faute de les avoir jamais rencontrés.
En revanche, de façon générale, le paysan d'origine que je suis, a beaucoup entendu de choses de ce genre, pendant ses années d'enfance dans son village de la Manche.
De plus, étant né sous le signe du Sagittaire, tout ce qui touche à l'occulte m'interpelle plus ou moins.
Mon histoire commence en Bretagne, pays des dolmens de Carnac, de Merlin l'Enchanteur, de la Forêt de Brocéliande, des Contes du Graal, des Monts d'Arrée et de ses druides...
J'avais été appelé par les sœurs d'un monastère qui pensaient que je pouvais leur être utile pour trouver une solution à un problème dans leur élevage de porcs. Comme toujours chez les sœurs, l'accueil fut extrêmement chaleureux. J'en fus très heureux ainsi que mon chauffeur, Père Antoine. Bien que la journée fût déjà avancée, les sœurs nous dirent qu'il n'était pas possible de regagner Bricquebec sans avoir auparavant rendu visite à nos frères cisterciens de Timadeuc, leur monastère se trouvant à une distance assez courte.
Avertis de notre venue, les frères nous firent le meilleur accueil autour d'une bonne table. Et les échanges allaient bon train, pendant que différents responsables venaient nous saluer et évoquer des sujets touchant à la vie religieuse. Bref, l'ambiance était excellente, du moins jusqu'à ce que...
Une précision s'impose : Antoine et moi étions originaires de la Manche. Mais il y avait une nuance à prendre en compte. Si mon origine manchoise était un fait dont je n'avais pas honte, ne n'y voyais pas pour autant un sujet sensible ; tel n'était pas le cas de Père Antoine. Cet homme, d'un calme olympien en apparence, pouvait tout d'un coup réagir à certains sujets de manière épidermique. Et le sujet de son appartenance à la Normandie en était un.
Après le défile des « huiles », arrive un frère convers de haute taille dont l'origine bretonne ne faisait aucun doute. Il se plaça le dos à un meuble, resta debout et nous demanda :
- D'où êtes-vous exactement ?
Je ne sais plus lequel d'entre nous lui apporta la précision :
- Nous sommes de Bricquebec dans la Manche !
Et le nouveau venu apporte une précision qu'il laissa tomber sur un ton dont le doute était absent :
- De la Manche ! Ah oui, grand pays de sorciers !
Antoine, comme piqué par une guêpe, réagit immédiatement :
- Grand pays de sorciers ! Grand pays de sorciers ! Il n'y a pas plus de sorciers dans la Manche qu'en Bretagne !
Le Breton ne s'avoua pas vaincu :
- Si, si ! J'ai lu le livre de l'abbé Untel sur le sujet et il est formel sur la question !
Un instant, je faillis intervenir pour apaiser les deux antagonistes. Sur la route du retour, alors que nous roulions avec notre Tub-Citroën, Antoine éprouva le besoin de ramener le sujet sur le tapis et me dit :
- Grand pays de sorciers ! Où a-t-il trouvé ça ?
Le frère breton par son affirmation hasardeuse venait de rallumer la querelle du Mont-Saint-Michel !
Je crois que c'est de ce moment de tension que me sont remontés en mémoire des récits entendus dans mon enfance dont la véracité reste à démontrer, mais qui, à certains moments, attirèrent la curiosité des journalistes. Pour commencer, j'évoquerai des faits qui se déroulèrent dans les années qui suivirent la Libération et dont le théâtre était la commune du Theil, près de Cherbourg. Je revois mon père lisant dans l'hebdomadaire « La Manche libre » des colonnes entières consacrées aux faits « merveilleux » qui se passaient alors dans cette commune. Il fut question, entre autres, d'une sorcière locale que l'on aurait vue se balader dans le ciel à califourchon sur un balai.
Les journalistes avaient-ils oublié la sagesse paysanne dont je vis un jour l'expression dans une caricature à la dernière page d'un Paris-Match oublié dans la salle d'attente d'un dentiste ? Le dessin représentait un couple américain, égaré dans la campagne, qui aperçoit soudain dans le ciel une sorcière en chevauchée sur son balai. Le couple de touristes, très impressionné, recherche de l'assurance près d'un couple de paysans qui, chacun avec sa faux, se penche vers le champ de blé arrivé à maturité. Du doigt pointé vers le ciel, les Américains désignent l'étrange phénomène. Et les paysans de répondre :
- Vous savez, chez nous, on ne s'occupe pas de ce que font les voisins !

Verkis Marcel
el Bricquebec

Iam, en la verda normanda kamparo, en la urbeto Rocheville, ne for de Bricquebec, loĝis Marja kun siaj gepatroj kaj gefratoj en malgranda pajltegmenta dometo. La malriĉa loĝejo staris lime de la kampoj. Tuj malantaŭ la malgranda legomĝardeno etendiĝis la Arbareto de la Ŝtonegoj. Ĝi estis malhela, humida, densa kaj silenta. Tamen aŭdiĝis nokte strangaj bruoj. Sume, ĝi aspektis stranga eĉ mistera precipe aŭtune, kiam la vento blovis inter la branĉoj aŭ vintre, kiam la arboj estis frostigitaj kaj dronigitaj en la malvarmaj nebuloj.
Multaj grandegaj grejsaj rokoj estis disŝutitaj ĉi tie kaj tie en la arbaro, ĉu kvazaŭ falintaj el la ĉielo, ĉu neklarigeble starantaj unu sur la alia. Inter tiuj ŝtonoj serpentumis malnovaj padoj, kaj troviĝis kaŝitaj kavoj kaj ombraj lokoj. La sunlumo apenaŭ penetris tra la arboj.
La maljunuloj de la vilaĝo mallaŭte asertis, ke oni ne laŭte parolu tie, ankoraŭ pli post la sunsubiro. Ili ofte mistermiene flustris aldonite “la arbareto fakte ne apartenas al la homoj, sed al la feinoj al la koboldoj kaj al aliaj misteraj estaĵoj, kiuj loĝas sub la rokoj, en la truoj de la mortintaj arboj aŭ inter iliaj radikoj.”
Marja fajfis pri tiaj diraĵoj kaj ĝentile mokis la superstiĉojn de la maljunuloj.
Sed estis legendo, pri kiu ŝi silente revis pli ofte ol ŝi volis konfesi. Sur la supro de la Granda Ŝtonego, unu el la plej imponaj ŝtonoj de la arbareto, videblis profunda spuro kun la formo de homa piedo. Neniu sciis, kiu aŭ kio iam faris ĝin. Laŭ iuj, temis pri marko de iu giganto, kiu iam paŝis sur la rokon; laŭ aliaj, feino markis la ŝtonon.
La plej maljunaj virinoj tamen havis alian klarigon. Laŭ ili, temus pri ŝtono sorĉita: “se fraŭlino metos sian piedon en la ŝtonan spuron” ili diris, “ŝi edziniĝos antaŭ ol la fino de la jaro.”
Fakte, inter la virinoj, kiu metis sian piedon en la spuron, kelkaj ja poste edziniĝis. La afero fariĝis des pli certa, ke pri tiuj, kiuj restis fraŭlaj, oni simple neniam parolis.
Marja estis dudekjara, kaj ŝia patrino jam plurfoje demandis ŝin, ĉu ŝi ne renkontis iun junulon, kiu plaĉus al ŝi. Kvankam, Marja neniam klare respondis, ŝi sekrete amis Petro-n, la filon de kamparano el la najbara vilaĝo. Sed Petro estis for. Jam de du jaroj, li estis devigita fari sian militservon, kiu tiam daŭris tri jarojn.
Iam, dum aŭtuna griza kaj ventega vespero, Marja iris sola en la arbaron por kolekti fungojn. Survoje reen, ŝi estis preterpasonta la grandan ŝtonegon, kiam subite kvietiĝis la vento, silentis la birdojn kaj videblis sunradio, kiu lumigis la misteran spuron.
Mirigita de la neatendita ŝanĝo, Marja repensis pri la onidiro. Kvankam, ŝi ĉiam asertis ĝin sencensa onidiro, ŝi sekrete esperis, ke ĝi estas vera.
Hezite kaj fakte iom honte, ŝi kontrolis, ke neniu vidas ŝin, kaj grimpis sur la rokon al la spuro, en kiun ŝi metis sian piedon.
Unuavide, nenio okazis. Neniu feino nek koboldo aperis, neniu fulmo ekbrilis, neniu tondro aŭdiĝis. Marja ridetis al si mem kaj estis forironta, kiam paŝoj aŭdiĝis malantaŭ ŝi. Ŝi turnis sin sed vidis neniun.
- “Kiu estas tie?”
Neniu respondis sed daŭris la stranga mallaŭta bruo. Iomete timigita, Marja kuris hejmen.
Alvenante senspira kaj kun batanta koro, ŝi vidis ĉevalon ligitan al fosto antaŭ la domo.
Mirigita, ŝi eniris la solan ĉambron de la domo, samtempe kuirejo, salono kaj dormoĉambro kaj ŝi vidis, vi ja divenis, jes, ŝi vidis Petro-n.
La sekvajn tagojn ili ofte renkontiĝis. Ili promenis laŭ la malnovaj vojoj, longe interparolis kaj rememoris la tempon de sia infanaĝo. Petro rakontis pri sia vivo kiel militisto, Marja pri sia vivo en la vilaĝo dum lia malĉeesto.
Iun vesperon Petro demandis ŝin, ĉu ŝi kredis pri la legendo de la granda ŝtonego.
Marja ridis.
- “Ne. Sed mi iam faris ion iom stultan. Mi metis mian piedon en la spuron. “
Patro siavice ridetis kaj rebatis « Do la malnova legendo veras, ».
Kelkajn monatojn poste ili geedziĝis.
- “La Granda Roko ne mensogas”, diris la maljunuloj kapjesante.
Marja siaflanke neniam konfesis, ĉu ŝi vere kredis tion. Sed multajn jarojn poste, kiam ŝi jam estis maljuna kaj ŝiaj propraj gefiloj estis plenkreskaj, ŝi ankoraŭ kutimis viziti la arbaron, sidis apud la granda roko kaj longe admiris la malnovan spuron, susurante vortojn, kiujn neniu neniam sukcesis kompreni.
Pri la legendo, ĉu vera, ĉu malvera?
Nur la vento kaj la koboldoj scias kaj povus respondi.

Adaptis el tradicaia legendo
Bertrano
el Jibervil’

Farîĝu sumoisto!

PRI KIO TEMAS?

Esperanto-Sumoo estas legaddefio.

Ĝi estis elpensita de la japana esperantisto HORI Jasuo, kiu vizitis nian klubon en 2013, por ke esperantistoj legu esperantajn librojn.

Tiu ĉi konkurso ne estas lukto kontraŭ la aliaj partoprenantoj, sed nur kontraŭ vi mem.
Ĉiu do povas sukcesi, ne gravas la nivelo!
La aliĝintoj elektas mem Esperantan libron kaj decidas mem kiom da paĝoj ili legos ĉiutage dum la 15 tagoj de la konkurso.
Kiu plenumos sian tagan taskon venkos!

La 102-a Sumoo okazos de la 8-a de novembro dum 15 tagoj. Kiel partopreni en ĝi?

Elektu libron, kiun vi legos dum la konkurso.
Decidu kiom da paĝoj vi legos ĉiutage laŭ via kapablo.
Aliĝu: sendu la jenajn informojn al HORI Jasuo: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp

- vian nomon, vian sekson, vian landon, la nomon de via urbo, vian retadreson
- vian luktistan nomon (kaŝnomon)
- la titolon kaj la nomon de la aŭtoro de la libro, kiun vi legos.
- la nombron da paĝoj, kiujn vi legos tage

Kiam komenciĝos la Esperanto-Sumoo, ĉiun kvinan tagon raportu al la prizorganto pri via venko aŭ malvenko.
Se vi legas la promesitan paĝojn , vi akiros venkon, se ne, malvenkon.
(Venko estos markita per litero "o", malvenko per litero "x".)
Tiamaniere vi luktas kun la libro dum 15 tagoj.
Je la fino de la periodo, vi ricevos atestilon kaj... miros pri viaj progresoj!

Pli da informoj: 🔗 **http://www.esperanto-sumoo.pl/**

LA ĈI-TRIMESTRA CENTVORTA MIKRONOVELO.

Per nefirma fingro, mi sonorigis.
Miozotojn mi alportis. Florlingve: «Neniam mi forgesos vin.»

Ŝi respondis al mia letero sindeteneme.

Certe ŝi timis rendevui kun nia estinteco.
Kiam mi forlasis nian urbeton, ni promesis unu la alian : «Ĉiam...», «Jes ja...», «Neniam...».

Jaroj pasis. Hodiaŭ revenas mi.
Ŝi edziniĝis kun bela, bona, riĉa viro. Pasie ŝi amas lin kaj la du infanojn, ŝi skribis.

Kompreneble, ŝi ne aldonis : «sed...»
...Tamen.

Paŝoj aŭdiĝas. Malfermiĝas la pordo.
Ne estas ŝi, sed li.

Li ĵetas al mia vizaĝo mian leteron kaj abrupte batfermas la dompordon.
Tie, iu korŝirmaniere plorĝemas.

Velkas la floroj falintaj teren.
Ankaŭ mi velkas.

Verkis Bertrano
(el Ĵibervil')

Ni esperas vian centvortan mikronovelon. Sendu ĝin al ***esperanto.herouville.14200@gmail.com***

Malkovru senpagan revuon.

La 14-a numero de la ĉiumonata senpaga revuo *Literatura Vivo* aperis.



Ĝi enhavas 182 paĝojn.
En ĝi trovu anoncojn, novelojn, intervjuon, poemojn, eseojn, rakontojn, recenzojn el la tutmonda esperantista verkistaro, (inkluzive de HORI Jasuo).
Libere elŝutu ĝin ĉi tie 🔗 https://www.literaturavivo.com/
La revuo estis fondita en junio 2025.
El la retejo estas elŝutebla 🔗 speciala kunigita eldono de ĉiuj revuoj eldonitaj dum la unua jaro. Ĝi enhavas 1 675 paĝojn!
Bonan legadon!

Kantu ni en Esperanto

Ĉe la **retejo** 🔗 **https://www.esperantofre.com/kantoj/kantomr1.htm**
disponeblas pli ol 100 kanzonoj alireblaj laŭ la aboco, kaj laŭ numero.
Ligita al ĉiu titolo, vi trovos la tutan tekston, ligilon al Jutuba filmeto, mp3 dosieron por elŝuti aŭ aŭskulti!

024 Akvarelo
085 Al kiu
008 Amas mi
094 Amegi iun
073 Amhistorio
065 Amo kara amo bela
016 Amo sub lunluno
022 Amovortoj sursable
045 Anĝeletoj negraj
023 Animo kaj koro
012 Animo mia
095 Aniaŭ vi komprenos
021 Aŭschwitz
044 Ave Maria Reĝino de la espero
103 Bileto por rajdi
081 Blovantas en la vento
053 Brila kometo
034b Caminito (hispane)
025 Ĉampano
035 Ĉieleto linda
013 Ĉi enamiĝi
036 Ĉu vi solas ĉi nokton
006 Dancejo ĉe l'maro
032 Dankas mi la vivon
062 De mi al vi
055 En blu' farbita de blu'
049 En foiro de la oriento
042 Esperantisto
061 Estu tiel
067 Eta kaj granda amo
043 Eŭropo
054 Fallĉan naskiĝdatrevenon
033 Fremdaj en la nokto
071 Haleluja
104 Hej Ĝude
017 Hieraŭ mi
095 Iam estis knabo
070 Imagu
105 Io
011 Io stulta
022 Jen mia kanto
108 Kara muziko
058 Kia mirinda mondo
072 Kiam kiam kiam
082 Kien iris ĉiuj floroj
057 Kiom pluvis
052 Kisoj
026 Kisu min multe
096 Kiu haltigos la pluvon
019 Knabino
031 Kvazaŭ kolombo blanka
027 La amatino de amiko mia
046 La ĉielo en una ĉambro
041 La domo de naskiĝanta sunо
080 La Espero
075 La fino
100 La forturo
030 La trenduto
097 La kanzono de la suno
026 La knabo de strato Gluck
073 La kolombino
087 La lamento de la toro
086 La mondo ŝanĝiĝos
029 La nokto
083 La sono de silento
040 La tango de la rozoj
080 La trajno fajfadas
020 La transterkutena koramikino
077 La unua, la lasta, ĉio por mi
048 La vivo rozkolora
096 Larmo sorvizaĝa
058 Lasu ke mi kantu
037 Ligita al unu sabloro
064 Manŭela
038 Marina
069 Mi dankas vin
050 Mi estas kradanto
090 Mi ne povas rezigni enamiĝi al vi
102 Mi preĝos por vi
015 Mi vagabondo
051 Mia kato
039 Mia preĝo
028 Mirindaĵo
091 Ne forgesu memori min
079 Necesas Floro
003 Nun aŭ neniam
034 Padeto
083 Paroloj milda, amo
059 Patro nia
082 Pensu pri mi
014 Pluvas
106 Prenu mian spiron for
084 Restu ĉe mi
069 Rezignu
101 Ridetu
064 Rigaj rozoj por vi
018 Sapere de salo
107 Savu la lastan dancon por mi
089 Se Dio volas
056 Se mi estus
093 Se mi perdos eĉ vin
074 Sinjoro, mi estas Manŭel
047 Suzana
085 Ŝin mi amas
099 Venas nun la suno
001 Vi restis sola
007 Vokis mi nur por diri
010 Vortoj
078 Vortoj ne facilas al mi

Manuel (vernome Emanuele Rovere) estas itala esperantista kanzonisto.
En sia junaĝo li kantis kaj gitaris en lokaj muzikgrupoj de sia urbo. Li estis devigita ĉesi kanti dum pluraj jaroj post ĥirurgio ĉe la voĉkordoj en 1985.
Post kiam li emeritiĝis en 2010, li esperantistigis poemojn kaj kanzonojn, kaj gitaris kaj kantetis, kvankam la kuracistoj malkonsilis al li tion fari.

Disponeblas en nia libroservo — Hotelo Paradizo novelaro, verkita de Gérard Sénécal

12 €

1975. En Koronios, la hotelo Paradizo , konstruata de la greka masonisto Dimitrios Kostantinidos akceptas la francan familion Portal, siajn unuajn klientojn. Bebo, poste knabineto, la juna Milena Kostantinidos travivas feliĉajn tagojn.
Plurajn jarojn poste, la japana studanto Takeŝi Kanamori, neatendite vojaĝas al Grekio kun iu S-ro Bernard Portal. Tiu ĉi deziras revidi hotelon en kiu li feriis, kiam li estis infano. Ŝajnas, ke ĝi estas de longe fermita!
2015. En hospitalo, Bernard Portal ne kredas kion li vidas! La flegistino, kiu zorgas pri li ... Ĉu ŝi eble estus Milena, la filino de la greka masonisto?

ALKLAKU ĈI TIE POR MENDI aŭ sekvu tiun ĉi ligilon https://tinyurl.com/Libroservo

La strandoj de la elŝipiĝo fariĝis Monda heredaĵo.

Krom la jam enlistigitaj normandaj mirindaĵoj urbo Havro kaj Monteto Sankta Mikaelo, UNESKO aldonis fine de julio la strandojn de la elŝipiĝo al la listo de la monda heredaĵo.

UNESKO difinas sin kiel konsciencon de la mondo, kaj de jardekoj anticipas la problemojn aŭ levas ilin. Same pri protektado de niaj riĉaĵoj!

Protekti materiajn kaj nemateriajn heredaĵojn.

Jam Prosper Mérimée listigis la monumentojn, kiujn necesas protekti: preĝejoj, kasteloj, monaĥejoj al kio aldoniĝis pejzaĝoj.
Ĝis 2002, estis 6 kulturaj kriterioj, sed poste aldoniĝis naturaj (naturaj fenomenoj de natura beleco). Al la "materiaj" heredaĵoj aldoniĝis la "nemateriaj": ekz. spektakloj, artaj metioj, kuirtradicioj, rakontoj kaj legendoj, sociaj praktikoj (ekz. karnavaloj, edziĝfestoj, aŭ familiaj ĉetablaj manĝoj, ks). En posta ŝtupo venis la memoraĵoj de la homa genio (ekz. sencementaj muroj el simplaj ŝtonoj), esceptaj stadioj de la historio de nia planedo; uzo de maro aŭ tero (haveno de Liverpool). Pro tro da proponoj, UNESKO donas nun prioritaton al kunaro de ĉefverkoj: ekz la konstruaĵoj de Le Corbusier, la defendaj fortikaĵoj de Vauban (en Francio), kaj al lokoj ligitaj al memoro (ekz. en Suda Afriko, la memorlokoj ligitaj al Mandela; de Ĉinio al Eŭropo, la silkaj vojoj). Aŭ al diversaj konstruaĵoj, kiuj signas vivmanieron: suda kanalo (Canal du Midi) aŭ mineja kvartalo (bassin minier) en Pas-de-Calais. Aŭ praktikoj komunaj al pluraj landoj: ekz. ĉasado kun rabobirdo.

Kiel eniri la liston kaj resti?

Vi imagas, ke necesas plenigi plurpaĝajn dokumentojn kun emfazo pri la originaleco, la specifeco de la koncerna proponita aĵo. Mi iam tagmanĝis en UNESKO kun komisionanoj, kiuj diris, ke ili havas la impreson labori en vojaĝagentejo, kiu varbas pri allogaĵoj! La landoj, kiuj ne povas proponi jarcentan monumenton proponas praarbaron, nacian parkon, groton, meteorologiajn restaĵojn. Agnosko de UNESKO ne alportas monon (UNESKO ne havas monon, la enspezoj konsistas el kontribuo de la unuopaj ŝtatoj) nur "gloron" kaj prestiĝon, kaj evidente altiras turistojn, fotistojn ks., kaj kontribuas al la ekonomio de la koncerna lando. Sed agnosko ne estas eterna: ekz. en Germanio, la valo de Elbe eniris la liston de la heredaĵo pro la natura beleco ... ĝis oni konstruis ponton (en 2009)! Same la haveno de Liverpool perdis la agnoskon, kiam transformoj ŝanĝis la uzon de tero kaj maro (2021) .

La strandoj de la elŝipiĝo (les Plages du Débarquement)

La strandoj de la elŝipiĝo de la 6-a de junio 1944 eniris en 2026 tiun prestiĝan liston: tiu agnosko certe protektos ilin de betonigo, konstruo de artefarita haveno. Gratulon al la regiono Normandio, kiu sukcesis post longaj demarŝoj, sed tiu albordigo plene respondas la homan genion, plurlandan kunlaboron, memorlokon. Dankojn al la organizantoj de la landa kongreso 2026, kiu kondukis nin al tiuj lokoj okaze de tuttaga ekskurso. Se la Monteto Sankta Mikaelo (Mont Saint-Michel) evidente indas je protekto, ni eble ne pensus protekti strandon, sablon kaj bunkron! Danke al la agnosko de UNESKO, tiu geografia zono estas protektita kaj ni esperu, ke ĝi bremsos la emon de konstruistoj!

Verkis Renée Triollle
el la Ciotat

Fotis Rémi Forall

Renée Triolle estis unu el la reprezentantoj de la Esperanto-movado ĉe Unesko

La statuo de Bill Millin, la sakŝalmisto

Fotis Cora Dion

Sur la steleo estas skribita: “Se ili memoras la sakŝalmiston, do ili ne forgesos la militservintojn kaj la falintojn de la strando.” La statuo estas memormonumento omaĝe al la francobritajn liberiĝintoj, kiuj elŝipiĝis tie.
Ĝi situas Place du Débarquement en Colleville-Montgomery, rande de la strando.
Millin, filo de skoto, estis unu el la sakŝalmistoj (en la angla *pipers*), kiuj ludis dum la dua mondmilito.
Ili tradicie marŝis antaŭ la skotaj trupoj dum la batalo. Tamen estis tiom da mortintoj inter ili dum la unua mondmilito, ke ekde tiam, tio estis malpermesata.
Asertante, ke ili ambaŭ estas skotoj, Lord Lovat konsideris sin ne koncernata de la angla
leĝo kaj ignoris ĝin; li petis Bill Millin, 21-jara, ludi Highland Landy, the Road to the Isles or Blue Bonnet over the Border survoje al Pegasus Bridge. Aŭdiĝis tiuj melodioj, kiam ili alproksimiĝis. La germanoj opinante lin freneza ne pafis al Millin.
Post sia malmobilizo (1946), Bill Millin iĝis policisto en Glasgow.
Estiel veterano, li partoprenis al la memorceremonioj. Post 2003, li daŭre vizitadis ilin, veninta per rulseĝo. Li mortis en 2010, tiam 88-jara. La statuo al Piper Bill estis inaŭgurita en 2013. Lia edzino kaj gefiloj daŭre omaĝas lin kune kun sakŝalmistoj.

La destrojero Svenner
(Foto Frosvarets Mueer)

La 6-an de junio 1944, Bill Millin elŝipiĝas kun sia sakŝalmo.
Foto Imperia Muzeo de la Milito

La statuo de la matroso.

Fotis Philippe Viault

La memorstatuo staras Placo de la kiraŝipo Courbet en Hermanville-sur-Mer, omaĝe al la 34 norvegaj maristoj, kiuj estis la unuaj mortintoj antaŭ la Elŝipiĝo.
Ilia destrojero, HNoMS Svenner(1), estis torpedita dum ĝi protektis la ŝiparon, kiu transportis la esŝipiĝontajn trupojn en Hermanville. Ĝia ankro estis pli malfrue retrovita kaj kuŝas nun ĉe la piedo de la monumento. Lia Moŝto Reĝo Harald la V-a kaj 150 veteranoj partoprenis la inaŭguron de la statuo okaze la 7-a de junio 2004 de la 60-a datreveno de la okazaĵo.
La katastrofo de Svenner altmare okazis la 6-an de junio 1944 fare de germana taĉmento veninta de Havro, kie la *Kriegsmarine* posedis grupon de rapidmotorboatoj (Schnellboote) (2).
Du germanaj torpedoj celen trafis la ŝipon. Svenner rapide sinkis, kaŭzante la forpason de 343 ŝipanoj. 185 viroj (inkluzive de 15 vunditoj) estis savitaj el ŝipanaro de 219 homoj. Tuj post la atako, la germanoj reen foriris al Havro sub protekto de la marborda artilerio.
59 jarojn poste, dum la somero de 2003, minforiga ŝipo de la Franca Mararmeo retrovis la ankron de la Svenner. Ĝemela monumento ankaŭ ekzistas en Oslo, Norvegio.

(1) Svenner estas la nomo de norvega insularo
(2) Por tiuj, kiuj jam vizitis (au vizitos) Havro-n, la enhavena bazo de la Schnellboote estis apud la ekranmuro apud la portransatlantika baseno.

Verkis Sylvie
el Havro

“Mi ne opinias, ke la Preĝo de la milito estos publikigata dum mia vivo. Neniu krom mortintoj rajtas diri la veron.”
Mark Twain (1905)

La ***Preĝo de la milito*** estas novelo de **Mark Twain**, publikigita postmorte en novembro 1916. Kvankam 110 jaroj pasis de tiam, la teksto estas plu tute aktuala.
Sojle de la foriro de la trupoj, pastro predikas en la vilaĝa preĝejo. Li fervorigas la trupojn kaj la lokan civilan loĝantaron. Li anticipe pravigas kaj glorigas la venontajn batalojn, kiujn li asertas esti la volo de Dio. Sed fremdulo interrompas lin, kaj asertante sin dia mesaĝisto, transdonas malan mesaĝon. Redonante al la malamiko ĝian homecon, li kondamnas la hipokritecon de la politika kaj religia retorikoj, kiuj glorigas patriotismon dum ili kaŝas la realecon kaj abomenojn de la milito.

Miachael Goorjian adaptis la novelon de Mark Twain per filmeto alirebla alklakante 🔗 ***ĉi tiun ligilon***. (https://www.youtube.com/watch?v=0ZmEAZCOYSE)

Tradukis el la angla
Bertrano el Ĵibervil’
(multe) helpis Tim Owen (Brita Esperanto-Asocio)

Tiam estis tempo de grandioza kaj entuziasma ekscito. La lando estis tumulta. Okazis milito. En ĉiu brusto brulis la sankta fajro de la patriotismo. Batis la tamburoj, resonis la fanfaroj, detonaciis la ludpistoloj, siblis kaj kraketis amasoj de petardoj. Ĉiuflanke laŭlonge de la svagaj sinsekvoj de tegmentoj kaj balkonoj, ondiĝadis konfuza amaso da flagoj, kiuj brilis en la suno. Ĉiutage la junaj volontuloj marŝis sur la larĝa avenuo, ĝojaj kaj belaj en siaj novaj uniformoj, kaj dum ili preterpasis, ili estis aklamataj de siaj fieraj patroj, patrinoj, fratinoj kaj de siaj amantinoj per voĉoj sufokataj de feliĉa emocio. Nokte, densa homamaso kolektiĝis por aŭskulti senspire la patriotajn paroladojn, kiuj kortuŝis ilin ĝisfunde, kaj kiujn ili interrompis post mallongaj intervaloj per tondroj da aplaŭdoj, kun vangoj inunditaj de larmoj. En la preĝejoj, la pastroj predikis devotecon al la flago kaj la lando, kaj alvokis la Dion de la Bataloj, petegante Lian helpon por nia justa afero, elverŝante elokventan fervoron, kiu kortuŝis ĉiujn aŭskultantojn.

Estis vere feliĉa kaj agrabla tempo, kaj la duonan dekduo da aŭdacaj spiritoj, kiuj kuraĝis malaprobi la militon kaj dubigi ĝian legitimecon, ricevis tiajn severajn kaj furiozajn minacojn, ke por sia propra sekureco ili rapide kaŝiĝis kaj ĉesigis tiajn ofendajn diraĵojn.

Venis dimanĉo matene. La sekvan tagon la batalionoj estis forirontaj fronten. La preĝejo estis plenplena. La volontuloj ĉeestis tie, iliaj junaj vizaĝoj lumigitaj de sentumeblaj sonĝoj — vizioj de firmaj puŝfortoj, kreskanta impeto, hastaj sturmoj, de brilantaj sabroj, de retreto de la malamiko, de tumulto, de ĉirkaŭanta fumo, de obstina postkuro, de kapitulaco! — Tiam, reveninte de la milito, sunbrunigitaj herooj, adorataj, bonvenigitaj, mergitaj en orajn oceanojn de gloro! Apud la volontuloj sidis iliaj amatinoj, fieraj, feliĉaj kaj enviataj de siaj najbaroj kaj amikoj, kiuj havis neniujn filojn aŭ fratojn por sendi al la honorkampo, por konkeri nome de la flago aŭ malsukcesinte morti la plej noblan el la noblaj mortoj. La diservo daŭris. Milita ĉapitro el la Malnova Testamento estis legita; la unua preĝo estis deklamita. Ĝin sekvis orgeno-eksplodo, kiu skuis la konstruaĵon, kaj leviĝis la tuta ĉeestantaro, kun okuloj brilantaj kaj koroj batantaj, ekkantante ĉi tiun enorman alvokon :

“Teruraga Dio ! Vi, kiu dekretas !
Tondro estu via trumpeto kaj fulmo via glavo!”

Tiam venis la “longa” preĝo. Neniu kapablis rememori similan pasian pledadon kaj lingvaĵon tiel emocia kaj bela. La refreno de ĉi tiu petego estis, ke Patro de ni ĉiuj, eterne kompatema kaj favorema, gardu niajn noblajn junajn soldatojn, kaj helpu, konsolu kaj kuraĝigu ilin en ilia patriota laboro; benu ilin, ŝirmu en Sia potenca mano ilin, faru ilin fortaj kaj memfidaj, nevenkeblaj dum la sanga momento de la batalo; helpu ilin detrui la malamikon, kaj donu al ili, al ilia flago kaj al ilia lando eternan honoron kaj gloron.

Maljuniĝinta fremdulo eniris kaj per paŝado malrapida kaj silenta antaŭeniris laŭ la ĉefa navo, la okulojn fiksitaj al la pastro, kun longa korpo vestita per robo, kiu atingis la piedojn, la kapon nuda, lian blankan hararon kaskadanta sur liaj ŝultroj en ŝaŭma katarakto, lian sordidan vizaĝon nenormale pala, eĉ pala ĝis malbelego.

Dum ĉiuj okuloj sekvis lin demandmiene, li daŭrigis sian silentan paŝadon. Sen halti, li paŝis apud la predikiston kaj staris tie, atendante. Kun fermitaj palpebroj, la predikisto, nekonscia pri lia ĉeesto, daŭrigis sian kortuŝan preĝon kaj fine konkludis ĝin per ĉi tiuj vortoj, fervore diritaj: "Benu niajn armilojn, donu al ni venkon, ho Sinjoro nia Dio, Patro kaj Protektanto de nia lando kaj de nia flago!"

La fremdulo tuŝis lian brakon, gestis al li, ke li flankenpaŝu — kion faris la ŝokita pastro — kaj sidiĝis en sian lokon. Dum kelkaj momentoj li ekzamenis la sorĉitan aŭdantaron per solenaj okuloj, en kiuj brulis kurioza lumo. Poste, per profunda voĉo, li diris:

"Mi venas de la Trono — portante mesaĝon de la Ĉiopova Dio!" Ĉi tiuj vortoj forte frapis la aŭdantaron. Se la fremdulo rimarkis tion, li neniel atentis. *"Li aŭdis la preĝon de Sia servisto, via pastro, kaj plenumos ĝin se vi tion deziras, post kiam mi, Lia mesaĝisto, estos klariginta ĝian signifon al vi — mi volas diri ĝian plenan signifon. Ĉar ĝi similas al multaj preĝoj de homoj, pro tio ke ĝi petas pli ol la eldiranto konscias — krom se li paŭzas kaj pripensas."*

"La servisto de Dio kaj la via eldiris sian preĝon. Ĉu li paŭzis kaj pripensis? Ĉu ĝi estas unu preĝo? Ne, estas du — unu eldirita, la alia ne. Ambaŭ trafis la orelojn de Tiu, Kiu aŭdas ĉiujn petegojn, la diritajn kaj la nediritajn. Meditu tion — memoru ĝin. Se vi volas petegi benon por vi mem, atentu! Ke vi, pretervole, samtempe ne altiru malbenon sur najbaron. Se vi preĝas por la beno de pluvo, kiun via rikolto bezonas, per tiu vi eble preĝas por malbeno sur la rikolto de via najbaro, kiu eble ne bezonas la pluvon, kaj povas esti difektita de ĝi.

"Vi aŭdis la preĝon de via servisto — la parton, kiun li elparolis. Mi estas komisiita de Dio por esprimi per vortoj la alian parton — la parton, kiun la pastro — kaj vi ankaŭ, en viaj koroj — preĝis fervore, silente. En kompleta nescio kaj sen pripensado? Se nur estu tiel! Vi aŭdis ĉi tiujn vortojn: "Donu al ni venkon, ho Sinjoro, Dio nia!" Tio sufiĉas. La tuto de la eldirita preĝo estas resumita en ĉi tiuj pezaj vortoj. Ne necesas ellaboraĵo. Kiam vi preĝis por venko, vi preĝis por multaj nediritaj rezultoj, kiuj sekvos venkon — kiuj necese sekvos ĝin, kiuj ne povos ne sekvi ĝin. Al la aŭskultanta animo de Dio falis ankaŭ la nedirita parto de la preĝo. Li ordonis al mi esprimi ĝin per vortoj."

"Aŭskultu!"

"Ho Sinjoro nia Patro, niaj junaj patriotoj, idoloj de niaj koroj, estas batalontaj — estu flanke al ili! Kun ili — en spirito — ankaŭ ni antaŭeniras, forlasante la dolĉan pacon de niaj karaj hejmoj por frapi la malamikon.
Ho Sinjoro nia Dio, helpu nin distranĉi iliajn soldatojn en sangajn pecetojn per obusoj; helpu nin kovri iliajn ridetantajn kampojn per la palaj formoj de iliaj patriotaj mortintoj; helpu nin kaŝi la muĝadon de la kanonoj per la krioj de iliaj vunditoj tordiĝantaj pro doloro; helpu nin detrui iliajn humilajn hejmojn per uragano de fajro; helpu nin turmenti la korojn de iliaj senofendaj vidvinoj per bana malĝojo; helpu nin senigi ilin je ŝirmejo, kun iliaj malgrandaj infanoj, por ke ili vagu, senamikite, tra la dezertaj ruinoj de sia lando, ĉifone vestitaj, malsataj kaj soifantaj, eltenante la flamojn de la suno kaj la glaciajn ventojn de la vintro, la spiriton rompita, elĉerpitaj de dolora laboro, petegante Vin doni al ili la rifuĝon de la tombo, kiu estas rifuzita al ili — por ni, kiuj adoras Vin, Sinjoro, neniigu iliajn esperojn, detruu iliajn vivojn, plilongigu ilian amaran pilgrimadon, pezigu iliajn paŝojn, akvumu ilian vojon per siaj propraj larmoj, makulu la blankan neĝon per la sango de iliaj vunditaj piedoj!"

"Ni petas tion pro Amo de Tiu, Kiu estas la Fonto de Amo, kaj Kiu estas la rifuĝejo de ĉiuj, kiuj estas ŝarĝitaj per malbonoj kaj serĉas Lian helpon per humila kaj pentoplena koro."

"Amen."

(Post paŭzo.) *"Por tio vi preĝis; se tio estas ankoraŭ kion vi deziras, parolu! La mesaĝisto de la Ĉiopova atendas."*

Poste oni konstatis, ke ĉi tiu viro frenezas, ĉar tio, kion li diris, havis nenian sencon.

Mark Twain

LibreOffice 26.8

LibreOffice estas senpaga libera oficeja programaro. Ĝia interfaco disponeblas en 120 lingvoj, inkluzive de Esperanto.

La programaro ne disponigas al la uzanto iujn ajn artefaritintelektajn servojn. Ne temas pri manko, sed pri vola elekto respekti viajn personajn datumojn: neniuj dokumentoj estas senditaj al malproksima servo por prilaborado, kaj la programaro eĉ ne postulas retaliron por funkcii, nek postulas, ke vi kreu konton aŭ abonu al iu ajn servo.
Ĝi enhavas ses ilojn verkilon (Writer), tabelilon (Calc), prezentilon (Impress), desegnilon (Draw), datumbazon (Base), formulilon (Math).

Writer estas potenca tekstoprilaborilo, kiu proponas specifajn ilojn por esperantistoj.

- Ĝi aŭtomate kontrolas la literumadon de tekstoj en Esperanto. Korektilo substrekas ruĝe la erarojn kaj proponas korektojn.
- Ĝi havas tezaŭron, kiu kapablas proponi sinonimojn.
- Ĝi aŭtomate anstataŭigas x-literojn per supersignaj literoj. Tajpo de "cxirkaux" aperos kiel "ĉirkaŭ"
- Ĝi ne aldonas spaceton antaŭ duoblaj interpunkciaj signoj ";" ":" "!" "?".

Versio 26.8.0 estas elŝutebla de la fino de aŭgusto.
Ĝi disponeblas en Esperanto **ĉi tie: https://eo.libreoffice.org/elsxuti/**

Se necese, en la menuobreto supre de la ekrano,

- Iru al "LibreOffice > Preferoj".
- Malfermu la menuon "Lingvaj Agordoj > Lingvoj kaj lokaĵaroj".
- Alklaku 'Ĝenerale"
- En la opcio "Lingvo de fasado", elektu "Esperanto".
- Faru same en la opcio "lokaĵaraj agordoj"
- En la rubriko "Aprioraj lingvoj por dokumentoj", agordu la opcion "Okcidenta" al "Esperanto".

BITARKIVO PRIZORGAS LA ARĤIVOJN DE LA NORMANDA ESPERANTO-BULTENO.

🔗 ***BitArkivo*** *estas reta deponejo, kiu celas konservi ciferecigita la Esperantan heredaĵon (gazetojn, librojn, aŭdio-dokumentojn, ktp), ke ili neniam malaperu.*
La enretigitaj dokumentoj estas senpage alireblaj kaj elŝuteblaj. Dek jarojn post sia fondiĝo, la retejo nuntempe disponebligas al la esperantistaro ne malpli ol 919 gazetojn!

Inter ili nun trovîgas 🔗 ***la 319 retrovitaj Normanda-j Stelo-j kaj normanda-j Esperanto Bulteno-j****.*

De 1914 al 2026, la pli ol centjara kolekto estas preskaŭ kompleta!

Kontrolu viajn subtegmentojn kaj forblovu la pulveron de viaj librobretaro; mankas nur:

- *koncerne la Normanda-jn Stelo-jn,*
  - *tiuj, kiuj estis publigitaj antaŭ januaro 1912, n-roj 03/5 → 05/5 (marto 1912 → majo 1912), ĉiuj, kiuj estis publigitaj post aŭgusto 1914*
- *koncerne la Normanda-jn Esperanto-Bulteno-jn*
  - *n-roj 08 (julio 1934), 54 (majo 1960), 63 (junio 1962), 70 → 73 (novembro 1963 → septembro 1964), 76 → 77 (marto 1965 → marto 1966), 82 (aŭgusto 1967)*

Krom Iván Garciá, kiu proponis konservi niajn revuojn en la retejo, kiun li fondis en januaro 2016, estu varme dankita Pierre Lemarchand, kiu prizorgis la arĥivojn de la Normanda Federacio dum multaj jaroj kaj konsentis transdoni ilin.

Oficiala apero de la albumeto *Revivi* la 15-an de septembro

Nia amiko Armel Amiot regalis nin dum la kongreso de Espéranto-France en Hérouville per kelkaj kanzonoj el sia nova albumeto "Revivi", kiu tiam ne jam aperis.
Post "Banĝo Esperanto" (2022) kaj "Dezertoj" (2024) lia nova albumeto "Revivi" aperos la 15-an de septembro ĉe Vinilkosmo.

Normanda Esperanto-Bulteno petis lin prezenti sian novan diskon.

La suno, simbolo de la tempo asignita al ni. Ĝi leviĝas, ĝi trairas la ĉielon, ĝi subiras – kaj en tiu sola tago kuŝas tuta vivo. La kvar sezonoj de homa ekzisto, de printempo ĝis vintro, estas ĉiu ilustrita ĉi tie per kanto.
La tuto estas enkadrigita de du poemoj: la unua kiel ia enutera vekiĝo, la lasta kiel preludo al la granda foriro. Ĉi tiuj du poemoj estas skribitaj inverse, kun nur etaj diferencoj – al la mondo, aŭ el la mondo.
Ĉio komenciĝas per " Tagiĝo ". Aŭroro, la plej unua lumo, la transiro de la utero al la mondo. Ni ankoraŭ scias nenion, kaj eble tie ni estas plej vivaj.

" Unua pluvo " estas la kanto de printempo kaj la sovaĝa espero de juneco. " Mojosa somero ", lla senbrida frenezo de rokenrola somera nokto. Poste venas aŭtuno kun " Aŭtuna lumo " kaj ĝia malespera deziro plilongigi tiun belan lumon. Kiam ĝi iom post iom svagiĝas en malhela kaj glacia vintro, " La lasta suno " fariĝas kvazaŭ evangelia preĝo adresita al la suno, kies revenon ni ankoraŭ esperas.
La cirklo fermiĝas per " Gliti en revo ". La sama kanto kiel en la unua mateno, sed inverse, kiel filmo rebobenata. Ĉi-foje ni jam ne timas: ni glitas. Kaj en ĉi tiu glitado, la kantoj, kiujn ni ĵus aŭdis, ekbrilas pretere – vivo disvolviĝanta unu lastan fojon.
Ĉi tiu albumeto povas esti aŭskultata ripete.
Revivigita. Revivi.

Aŭtoro kaj komponisto : Armel Amiot
Kun :
– Armel Amiot : ĉefkantisto kaj ĥorkantoj, gitaro, banĝo, hammond-orgeno.
– Bernardo Sacconi : kontrabaso (trakoj 4 kaj 5).
– Dan Gallagher: elektra baso (trakoj 2 kaj 3).
– Francesca Prattico : drumo kaj perkutiloj.

Kun la helpo de Liven Dek pro provlegado kaj korektado de la Esperantaj kantotekstoj, de Alice Lucas pro inspiro, de Floréal Martorell pro subteno kaj kuraĝigo, kaj de Denis Lainé pro aŭskultado kaj provizado de bonegaj mikrofonoj!

Armel kantas ankaŭ en la franca.
La 19an de septembro en Préaux (Orne) kaj la 9an de oktobro en Crozon (Finistère), li koncertos omaĝe al Marcel Mouloudji.
🔗 **Ligilo al filmeto, en kiu li prezentas sian koncerton "Monsieur Marcel"**: https://youtu.be/EDa_cbuF0D4?si=TrGbatJc3i8ThfEx